

# **Protokolo de estrara interkonsiliĝo de Norvega Esperantista Ligo lundon la 6-an de majo 2019 per Skype.**

(Aprobata la 9an de junio 2019.)

## **Partoprenis:**

Ulf Lunde en Os

Mario Machlik en Tromsø

Lars Sandbakk en Sandnes

Amelie Matt en Tromsø

Heming Welde Thorbjørnsen en Oslo

Jardar Eggesbø Abrahamsen antaŭanoncis sian foreston

Anne Karin Bondhus en Bryne forestis pro malsano

## **0. Tagordo**

La planita interkonsiliĝo je la 29a de aprilo estas movita al la 6a de majo.

La tagordo, dissendita je la 4a de majo, estas aprobata.

## **1. Aprobo de la protokolo de la interkonsiliĝo la 25an de marto**

Aprobata.

## **2. Ekonomio**

Pro foresto de la kasisto ni prokrastis tiun punkton al la venonta fojo.

## **3. Jarraporto, jarkalkulo 2018**

Pro malsano ĉe la kasisto, la jarkalkulo ankoraŭ ne pretas.

Per telefono dum la interkonsiliĝo, Anne Karin Bondhus raportis, ke mankas nur tre malmulte nun.

## **4. Landa Kongreso 2019**

La limdato por aliĝo estas la 15a de majo.

Aliĝis ĝis nun sep membroj (de ekster Tromsø). Inter ili estas nek estraranoj nek junuloj.

Amelie Matt sendos memorigilon kaj aliĝilon al nia retlisto NEL-inform.

## **5. Norvega Esperantisto**

Okazis diskuto pri la estonteco de nia membrogazeto.

Ĉu eblas starigi teamon por ke Douglas Draper ne plu estu sola en la redakcio?

Ĉu ŝanĝi la nomon de la gazeto? Ĉu eventuale la apertitmon aŭ la formaton (paperan/elektronikan)?

Ĉu aliaj kanaloj eble povus transpreni (kelkajn el) la rolojn de Norvega Esperantisto?

La estraro diskutis la taskojn, eblajn solvojn kaj troveblajn laborfortojn/kapablulojn/emulojn. Ĉu eble estas pli grave elspezi pli da fortoj por teni nian retejon ĝisdatigita?

Por ekscii, kion pensas la membroj pri la afero, indas starigi diskuton pri ĝi dum la Landa Kunveno en junio.

## **6. Esperantonia**

Okazis diskuto pri la estonteco de Esperantonia.

Ni nun vivas en tute alia mondo ol kiam NEL ekhavis sian ejon en Oslo. Esperantonia estis vere grandioza donaco, sed kiom ni konkrete bezonas ĝin hodiaŭ? Estas ege koste por ni havi kaj manteni tian ejon.

Krom esti nia oficiala oficejo, nuntempe ĝi funkcias pli kiel arĥivo/stokejo ol kiel laborejo. Nur la klubo de Oslo uzas la kunvenĉambron (dufoje monate), kaj ili sendube povus trovi alian sen- kostan alternativon.

Pro ĝia historio estus domaĝe vendi ĝin, sed ni ne havas praktikan sistemon por aranĝi luigadon de la ejo al aliaj organizoj, kaj ĝia situo (en loĝeja kvartalo) estas maloportuna por fari ekz-e kaf- ejon. Tio cetere postulus ankaŭ plian renovigon.

Esperantistoj estas malmultaj, do NEL tute ne bezonas malfermitan bibliotekon; por la libroj ni povus lui malmultekostan stokejon aliloke. Se ni vendus Esperantonia, ni dum multaj jaroj havus sufiĉe da mono por lui aliajn ejojn kiam ni bezonos tion.

Por ekscii la opinion de la membroj (kaj de la Oslo-klubo), la estraro rekomendas, ke la Landa Kunveno diskutu la aferon.

## **7. Ŝanĝoj en la statuto de legaco Uhlen**

La estraro de NEL ricevis de la estraro de Legaco Uhlen proponon pri ŝanĝoj en la legaca statuto. La ŝanĝoj malambiguigas kelkajn esprimojn, ŝanĝas la limdaton por petoj de la 31a de januaro al 28a de februaro pro necesaj informoj de la banko, kaj forigas la referencojn al Norvega Esperantista Fervojista Asocio pro ties efektiva malfondo. La estraro de NEL decidas aprobi la ŝanĝojn.

*På norsk: Styret i Norsk Esperanto-Forbund har motteke eit framlegg frå styret i Uhlen's legat om endringar i statuttane for legatet. Endringane eintydiggjer nokre uttrykk, endrar søknadsfristen frå 31. januar til 28. februar pga. naudsynte opplysningar frå banken, og fjernar referansane til NSB Esperantoforbund fordi dette i realiteten er nedlagt. Styret i Norsk Esperanto-Forbund vedtek å godkjenne endringane.*

## **8. Eventualaĵoj**

- a) Ĉu la Uhlen-legaco subtenos vojaĝojn al Tromsø por partoprenantoj de la landa kongreso? Povas esti, sed ni ne anoncu tion en la aliĝilo.
- b) Teknike eblas partopreni la Landan Kunvenon digitale per Skajpo. La estraro decidis ne antaŭanonci tion en la aliĝilo.

**La interkonsiliĝo daŭris 20:00h – 21:35h kaj estis la lasta kunveno de tiu ĉi estraro.**

**Raportis Ulf Lunde**